

## Franca atoma giganto rande de la abiso

Sabaton, la 22an de Novembro 2014

*de Michael Leibman*

La Pariza ĵurnalo Le Monde raportis ĉi-semajne pri la krizo de la franca atomindustria firmao AREVA. La krizo publike vidiĝis la antaŭan semajnon kiam la prezidanto de la firmao Pierre Blayau estis maldungita. Aliaj implikitaj ofte atribuas la kulpon pri tiu drama situacio al la misa mastrumado de unu el la antaŭulo de Blayau, Anne Lauvergeon (alinomita "Atomic Anne"), prezidanto de AREVA ekde ties fondo en la jaro 1999 ĝis ŝia eksigo en 2011. Tiam Lauvergeon estis anstataŭita de Luc Oursel kiu siavice, kiel kutime por la atomenergia sektoro, longe kaŝis la ciferojn kiuj anoncis la nun eksplodantan krizon. Oursel demisiis antaŭ unu monato, laŭ siaj propraj diroj pro sanaj problemoj.

Lauvergeon, eminenta en socialistaj rondoj, de longe montriĝis ambicia kaj optimisma kaj investis grandskale, precipe aĉetante la Kanadan uran-produktanton Uramin kaj tio, se aŭskulti ŝiajn kritikantojn, je ekstravaganca prezo. Tamen pli fundamente ol eblaj mastrumaj eraroj, estas la malfacilaĵoj en kiuj baraktas nuntempe la nuklea industrio. Unuflanke, la eventoj de Fukuŝimo montris ke atomaj instalaĵoj funkcias daŭre ĉe la rando de katastrofoj, kaj tial kaŭzis falon de la postulado kaj por novaj atomaj centraloj kaj por la rilata uranio.

Aliflanke, ne nur Lauvergeon pekis pri troa optimismo. La Eŭropa Premata-Akvo Reaktoro ("EPR", france kaj angle) montriĝis revo de teknokratoj, tute ne kapabla ekfunkcii je la planitaj datoj aŭ je la antaŭviditaj prezoj. La leganto juĝu mem: komencinta en la jaro 2007 la EPR de Flamanville (Normandio) estus devinta liveri kurento al la nacia elektra koncerno EDF en la 2012a jaro. AREVA anoncas nun ke la konstruado finiĝos plej frue en la jaro 2017. La kostoj komence planitaj je 3,3 miliardoj da eŭropoj estas nun taksitaj je 9 miliardoj. Ankaŭ ĉe la konstruado de EPR reaktoro en Olkiluoto, Finnlando triobliĝis la kostoj kaj senĉese prokrastiĝas la ekfunkcio.

La financaj malgajnoj de AREVA superos unu miliardojn de Eŭro ĉi-jare, kaj la firmao estraro ne plu komunikas la ciferojn por la venontaj jaroj. La ŝuldoj de la firmao estas 4,7 miliardojn altaj por 4 miliardoj da propra kapitalo. Pro tio la freŝe enoficigita prezidanto Philippe Varin daŭrigos la vendadon de havaĵoj de la firmao, kaj oni eĉ konsiderus la forlason de la EPR branĉo, de longe postulitan de la ekologiemoj. Kaj finfine oni denove ĉerpos el la ŝtataj kasoj por kompensi la daŭre subtaksatajn kostojn de tiu malsana kaj malsaniganta industrio.